



## Protokolo de la Estrar-kunsido de ELI, la 6-an de Marto 2023

**Ĉeestantoj:** Jehoŝua Tilleman, Dror Gaon, Avigail Meŝulam, Inbar Mor, Amri Wandel.  
**Zome:** Ŝlomo Ŝaĥar, Gabi Zeevi. **Gastoj:** Silva Luna, Raja, Tomer Kedem (parte).

*Protokolo de la pasinta kunsido estis sendita al la estraranoj kaj baldaŭ enretigota.*

### 1. Raportoj

- a) **Dror:** ni forgesis renovigi la lupagon de la servilo de nia retejo. Bonŝance mi trovis alian, kie ni pagas nur 130 NIS por unu jaro (anstataŭ la kutimaj 500). Mi gardis la tutan enhavon de nia retejo en mia komputilo kaj enigis ĝin en la novan servilon. **Amri:** bonege – ne kiel post la UK en Tel-Aviv en 2000, kiam ties servilo paneis, nia tuta materialo pri la UK perdiĝis. La retejo de ELI en la nova servilo denove funkcias – oni devas daŭrigi la registriĝon al la IK!
- b) **Jehoŝua:** mi trovis la precizajn mortodatojn de Isaj kaj Anna Dratwer kaj nun eblos kontakti telefone kun la *Ĥevra Kadiŝa* en Bat-Jam por demandi pri ilia(j) tombo(j). **Amri:** kiam pretos ĉiuj datumoj, mi rekontaktos la tombo-fariston.
- c) **Jehoŝua** sendis la liston de la kotizintoj al UEA kun peto membrigi 3 israelanojn pere de Fondaĵo Canuto. **Gabi:** ĝuste hodiaŭ mi ricevis la konfirmon de UEA pri mia membreco.

### 2. Israela Kongreso – 13-15 de Aprilo en Tiberiado (Amri, Ŝlomo)

- a) Post multa laboro **Amri** jam pretigis la liston de la partoprenantoj laŭ ĉambroj. Lia telefona enketo evidentigis, ke preskaŭ ĉiuj israelanoj volas aldoni la trian nokton sabate (por la eksterlandanoj ĝi estos parto de la Postkongreso).
- b) La evento okazos en hotelo *Panorama*, la solena vespermanĝo – en la proksima restoracio *Hermitage*. Amri rezervis fiksan menuon por ĵaŭdo kontraŭ 100 NIS por ĉiu. Vendrede, kiam la fiksa menuo devus kosti 200 NIS, eblos libere elekti el la menuo. Pro manko de loko sabate, Amri rezervis en alia restoracio, *Greta*. Matenmanĝojn indas prepari memstare en la hotelo, sed eble Avigail, Enrica kaj Jael aĉetos ion komunan, malpezan, kaj ELI repagos al ili. Nia hotelo ne ofertas manĝojn, sed havas kuirejon, manĝsalonon kaj fridujon.
- c) **Amri** rezervis 15 ĉambrojn kaj devos redoni la superflujajn ĝis la 15-a de Marto. Eblas ankoraŭ urĝe registriĝi!
- ĉ) Amri negocis pri aŭtobuso por niaj ekskursoj, kaj jam fiksis la vojaĝon por la PK el Tiberiado ĝis la Rabin-limpasejo en Arava. Preskaŭ ĉiuj eksterlandanoj (12 el 14) partoprenos ĝin, eĉ ekestis problemo trovi liton. Ili veturos al la Morta Maro, Masada, Petra, Eilat, Jerusalemo, Tel Aviv – dum 6 tagoj.
- d) **Ŝlomo** baldaŭ pagos la duonon (ĉ. 7,000 NIS) de la sumo por la hotelo. La partoprenantoj devos pagi surloke la tutan sumon per kontanta mono, al la kaso de ELI. Tiel ni iom ŝparos, ĉar la hotelo kostos eĉ malpli (sen VAT).
- e) Bedaŭrinde, Ŝlomo, nia kasisto, verŝajne ne povos partopreni la kongreson, nek la venontan estrar-kunsidon (pro operacio la 3-an de Aprilo). *Plenan sanon al Ŝlomo!*

2/...



**3. Rekonfirmo de nia kontrakto pri konstruo-evakuo (Dratwerejo)** (Jehoŝua)  
**Jehoŝua** estis petita far la oficejo de la Adv. Josi Omid el Riŝon-Lecijin, ke ELI rekonfirmu nian kontrakton pri la konstru-evakua projekto en strato Ĥelmit en Bat-Jam. Eblas fari tion per unu mallonga frazo, kiun Jehoŝua formulos kaj sendos rete. **Voĉdono: unuanime por.**

**4. Magazeno por la libroj de ELI** (Ŝlomo, Jehoŝua)  
La solvo estos verŝajne per kontenero. **Ŝlomo** pretas instali bretojn; sed unue devas paroli kun la respondeculo en la kibuco, kaj certigi la lokon por longa tempo. Tamen, antaŭ serĉado kaj aĉeto de kontenero endas subskribi kontrakton (kun opcio aldoni plian) kaj ne pagi ĝis la kontenero alvenos. **Gabi** proponas tuj aĉeti du kontenerojn, pensante pri la estonto, pri vera biblioteko – ne nur magazeno kun skatoloj. **Amri**: Nur unu intertempe, eble sufiĉos – aĉeti plian ĉiam eblos.

**5. Israela Esperantisto 174** (Jehoŝua)  
Mikaelo ne povis partopreni hodiaŭ. Li ankoraŭ atendas de Amri du artikolojn (granda parto de la enhavo), kaj de Jehoŝua la nekrologojn (eĉ se tiu pri Rami Ŝlain ne estos nun inter ili).

**La venonta kunsido:** lunde, la 3-an de Aprilo 2023, je la 20h00 (Alon-Turo-2, hibride).  
*Protokolis: Gabi Zeevi*